

Eŭropa Bulteno

Aprilo 2008, № 4 (69)

De la redakcio...

Karaj legantoj,

Jen novaĵoj pri nia kuna laboro. Apartan gratulon al Maja Tišljar pro sukceso en la EACEA konkurso (legu sube).

Sekvaanta numero estos plejparte dediĉita al la infanoj, kaj mi invitas vin kontribui per artikoloj pri tiu la plej grava parto de la homaro. Atendante viajn rakontojn kaj fotojn mi deziras al vi agrablan legadon de la Eŭropa Bulteno,

Vesna Obradović

EŬROPA KOMISIONO APROBIS AL EEU SUBVENCION POR OFICEJO KAJ OFICISTO EN BRUSELO

EEU prezentis ampleksan peton novembre al Eŭropkomisiona Buroo por edukado kaj kulturo EACEA (EACEA - Education Audiovisual & Culture Executive Agency) okaze de konkurso AKTIVA CIVITANECO, kiu antaŭvidis finacadon de funkciaj kostoj de eŭroponivelaj organizoj kiuj kontribuas al aktiva civitaneco. La peton ellaboris Maja Tišljar (sur foto) kiel provizora oficisto de EEU en Bruselo kun la helpo de la sekretario de EEU.

Meze de aprilo 2008 EACEA publikigis rezultojn de la konkurso kaj inter aliaj organizoj ili aprobis ankaŭ la peton de EEU je iom mapli ol 56.000 euroj por funkciaj kostoj en la jaro 2008. Tio estas 80% de la planitaj kompletaj kostoj kaj la aliajn 20% EEU devas prizorgi mem, kion ĝi faros per la helpo de sinjoro Etsuo Myoshi kaj la propraj kotizoj. La financoj kovras la salajrojn de la oficisto, la kostojn de la oficejo (kiun EEU luis ekde februaro 2008 en la Domo de Internaciaj Organizoj MAI en strato Waŝington en Bruselo) kaj materiajn kostojn de planitaj aktivecoj.

Tio estas la unuan fojon ke EU financas iun Esperanto-organizon por ties funkciado kaj ekzisto kaj grava paŝo sur la vojo al certagrada oficialigo de Esperanto.

Aparte necesas substreki ke EK aprobis financadon nur al 36 eŭroponivelaj organizoj inter pli ol 300 petintaj.

Zlatko Tišljar

Eŭropa Bulteno



Maja Tišljar

PUBLIKA DISKUTO PRI MULTLINGVISMO

La 15an de aprilo 2008 la Eŭropa komisiono (departamento por edukado kaj kulturo) organizis en Bruselo publikan diskuton pri multlingvismo kiun partoprenis reprezentantoj de 153 organizoj. La evento markis la finon de publika demandado pri multlingvismo kiu okazis inter septembro kaj novembro 2007. La demandaro montriĝis kiel unu el la plej multreagaj inter ĉiuj similaj demandaroj iam ajn realigitaj de la Komisiono pri iu eŭropolitika temo. La demandaron respondis entute 2419 personoj en ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio, do multoble pli ol la kutima averaĝo inter 200 kaj 500 partoprenantoj de similaj demandaroj de la Komisiono. Tio bone montras grandan intereson pri la temo.

La enkondukon al diskuto prezentis la Komisionano Leonard Orban kiu parolis pri la uzado de la lingva diverseco en Eŭropo. Lian proladon sekvis prezentado de proponoj por la interkultura dialogo de la „grupo de intelektuloj“ kaj la prezentado de la rezultoj de la publika demandado pri multlingvismo. La proponojn pri tio kiel multlingvismo povas helpi la unuecon de Eŭropa Unio prezentis la sekretario de la reĝa belga akademio pri la franca lingvo kaj literaturo Jacques de Decker. La rezultojn de la interreta demandado prezentis la direktoro pri kulturo, multlingvismo kaj komunikado de la komisiono Vladimir Šucha post kio sekvis malferma diskuto. Posttagmeze oni laboris kadre de tri laborgrupoj. Ĉiuj dokumentoj prezentitaj dum la diskuto estas legeblaj ĉe http://ec.Eŭropa.eu/dgs/education_culture/consult/index_en.html

La diskuton partoprenis ankaŭ tri kunlaborantoj de EEU: la prezidanto Seán Ó Riain, Jozef Reinwart kaj Maja Tišljar. Seán Ó Riain kaj Maja Tišljar partoprenis la laborgrupon pri novaj defioj ĉe lingvolernado kadre kaj ekster formalaj eduksistemoj. Maja Tišljar prezentis la britan propedeutikan projekton „Springboard to languages“ kiu uzas Esperanton kaj Seán Ó Riain subtenis la prezenton per pliaj detaloj. Tiel Esperanto estis menciita ankaŭ en la fina resumo de la diskuto.

Tre ĝenerala resumo de la demandaro pri multlingvismo en la oficiala teksto de la komisiono montras la plej gravajn komunajn punktojn de la respondintoj:

- Pli ol 96% de la respondintoj konsentas ke por la lingva diverseco de EU necesas speciala atento de eŭropaj politikistoj kaj ke lingvokono estas grava por ambaŭ: por ilia persona ĉiutaga vivo kaj por ilia laboro.
- Laŭ la respondintoj la plej gravaj faktoroj por sukcesa lingvolernado estas frua eklernado kaj direkta sperto de la lingvo en la lando kie la lernata lingvo estas parolata.
- La plejmulto de la respondintoj opinias ke la lingva diverseco estas gardenda kaj ili deziras ke ĝi estu pritraktata en konteksto pli vasta ol nur ene de ekonomiaj aspektoj kaj eŭropunia funkciado, do konteksto kiu pritraktas identecojn kaj kulturojn kiujn la lingvoj reprezentas.
- Protektantoj de regionaj lingvoj kaj de lingvoj de la minoritatoj opinias ke oni devus fari pli por tiuj lingvoj, speciale kadre de la edukado kaj la publikaj servoj. Ili ŝatus ke la Eŭropa Unio transprenu pli protektantan rolon pri tiuj lingvoj.
- La plejmulto ŝatus ke la medioj promociu interkulturan socian modelon kiu valorigus lingvan kaj kulturan identecon kaj kiu fokusiĝus je toleremo kaj ne je konfrontado.
- La plejmulto de la respondintoj konsentas ke estas pli facile labori kaj negoci eksterlande se oni konas la lingvon de la medio kaj ke kompanioj pro tio devus interesiĝi pri la investado al lingvokono de la dungitoj.

- La majoritato konsentas ke la migrantoj devus konservi sian originan lingvon kaj pritrakti sian lingvan kaj kulturecan identecon kiel necesan bazon por integriĝi en la lingvan kaj kulturecan komunumon diversan de la propra.
- La plejmulto opinias ke la kostoj por laborado en 23 oficialaj lingvoj estas pravaj aŭ ke ili eĉ devus esti plialtigataj.

En la raporto konkrete estas menciita ankaŭ Esperanto sub la punkto 3: „Lingvoj kaj multkultura socio“. 12 % de la respondintoj al la demando kio laŭ ili estus la plej bona maniero respekti lingvan diversecon je loka, nacia kaj Eŭropa niveloj en multkultura socio, respondis uzante la nocion „lingua franca“ por la eŭropa nivelo kaj 4% proponis Esperanton kiel neutralan solvon.

Maja Tišljar

STRATEGIO POR AŬTORITATOJ EN EU

Ni esperantistoj malfacile povas kompreni la neesperantistan politikan mondon kiu ne kredas ke Esperanto estas lingvo normala kaj uzebla en ĉio. La "ekstera" mondo simple ne agnoskas tion kaj malakceptas Esperanton. Ni devas do truki. Se ni postulos enkondukon de nova lingvo neakceptita kiel eŭropa lingvo, ni ne havas ŝancojn. Sed se ni parolos pri enkonduko de lernobjekto por rapidigi lernadon de fremdlingvoj bazita je Esperanto ni povas sukcesi. Jen kion mi skribis al E.D.E. antaŭ ne longe:

E.D.E. estas partio kiu intencas kandidatiĝi por Eŭropa Parlamento en 2009 kaj serĉas strategion kiel politike klarigi al la voĉdonantoj sian lingvan strategion. Mi proponas la jenon:

"E.D.E. subtenas la rekomendojn de EU pri multlingvismo kaj sistemon en kiu ĉiu civitano devus scii almenaŭ tri lingvojn: la propran nacian lingvon, unu grandan mondlingvon kaj unu ŝatatan lingvon.

Por efektiviĝi tiun rekomendon E.D.E. proponas ke en la unua lernojaro oni komencu lerni la nacian gepatran lingvon kaj en la tria kaj kvara jaroj de elementaj lernejoj oni enkonduku antaŭpreparan lernobjekton baze de Esperanto kiu plirapidigas je ĉirkaŭ 30% la lernadon de aliaj fremdlingvoj pri kio ekzistis pluraj eksperimentoj, kiuj tion pruvis.

Post tio oni enkonduku lernadon de

- a) iu granda fremda lingvo laŭ elekto de la lokaj kaj landaj aŭtoritatoj,
- b) iun ŝatatan lingvon laŭ elekto de la gelernantoj (kiu povas esti kiu ajn lingvo por kiu eblas trovi instruistojn)."

(P.S. en la lasta punkto b) oni povas konsideri Esperanton kiel "ŝatatan" lingvon de infanoj kaj ke ili postulu tion en la fazo ekde la kvina lernojaro. Kiam ekzistus tiu eblo, kaj se la sistemo pri tri lingvoj fariĝus deviga, do ankaŭ elekti iun ŝatatan lingvon, ekestus la "hungara efeto". Nome multaj infanoj, kiuj per si mem ne havas iun "ŝatatan lingvon" elektus Esperanton pro tio ke ĝi estas la plej facila kaj pro tio ke ili jam komencis lerni ĝin en la fazo kiam ĝi servis kiel propedeŭtika helpilo.)

Zlatko Tišljar

KIAM BOATOJ EKPAROLAS ESPERANTON, EKSA URBESTRINO (EK?)SUBTENAS ĜIN - ĈU SINCERE?

De kelkaj monatoj jam, dank' al gratulinda klopodado de Cyrille Hurstel, aktivulo ĉe Espéranto-Strasbourg kaj Espéranto-France, eblas boate viziti Strasburgon aŭskultante antaŭregistritan komenton pri la urbo per kapaŭskultiloj en Esperanto. Entute, eblas elekti lingvon el 10. Kiel simbolplene estas promeni super akvo en la internacia urbo kaj aparte en la eŭropa instanca kvartalo aŭskultante klarigojn en esperanto ! La 22an de aprilo 2008, enkonduko de komentario en Esperanto sed ankaŭ de porinfanaj versioj en la franca, germana, angla kaj itala estis oficiale inaŭguritaj. Porturistan boaton oni flosigis ĉe la piedo de la parlamentejo. Estis atenditaj s-inoj Handzlik, Novak kaj Trautmann, respektive eŭrodeputitinoj en Pollando, Slovenio kaj Francio. Finfine venis nur s-ino Trautmann, malfeliĉe la aliaj ne sukcesis lastminute libereĝi. S-ino Trautmann estas eksa urbestrino de Strasburgo (1989-2001) kaj eksa ministrino pri Kulturo (1997-2000) en la registaro Jospin. Sur la boato, entute estis ĉirkaŭ 40 homoj el kiuj 1/5 estis esperantistoj, inter kiuj Cyrille Hurstel kaj Bruno Flochon, prezidanto de Esperanto-France. S-ino Trautmann ne nepre venis subteni Esperanton sed pli larĝe aldonon de pliaj voĉaj komentarkanaloj. Inter la ĉeestantaro ĉeestis studentaj ĵurnalistoj, kiuj praktikis intervjuojn kiel ekzercadon kun aliaj surboataj homoj, kiel s-ino Trautmann. La studentoj ŝajne venis aparte enketi pri enkonduko de Esperanto sur la turistajn boatojn, kaj pri Esperanto intervjuis s-inon Trautmann. Eblis aŭskulti, kion ŝi respondis. Ŝi disvolvis 2 minutan respondon, en kiu ŝi asertis ke Esperanto ja estas vera lingvo kaj ke ŝi eĉ iam havis la okazon subteni ĝin. Strasburgaj esperantistoj ne certis pri ŝia favoro kaj surpriziĝis pri tio, des pli ke kiel ministrino pri kulturo, ŝi nenion faris por Esperanto kaj eĉ nee respondis al invito al la Montpeliera UK en Francio en 1998 (eble simple pro manko da tempo?). Mi ne scias ĉu s-ino Trautmann ne aŭdacis fiparoli pri Esperanto ĵus post favora parolado pri ĝi kaj dum kvinono de la homoj estis esperantistoj, aŭ ĉu ŝi sincere esprimis sian koran penson. ĉar la ĵurnalistoj estis studentaj, la celo de la intervjuo ne estis esti dispektigita per televido, pro tio, estis malpli da risko (se temas pri risko !) diri ion favoran pri Esperanto. ĉiel, lokaj esperantistoj provos akiri la bendon por ekhavi pruvon pri la valora diraĵo.

EEU profitis tiun ĉi unuan kontakton kun s-ino Trautmann por paroli al ŝi pri la iniciato lanĉita post konsiloj de S-ro Geremek renkontita januare okaze de la ekspozicio pri Esperanto kiu okazis en la brusela parlamentejo. ĉar s-ino Trautmann estis tuj forironta, la kontakto estis fulma, sed eblis transdoni al ŝi liston de deputitoj konsentaj por partopreno en malferma diskutado en la brusela parlamentejo pri "Esperanto, amiko aŭ malamiko de plurlingvismo" kaj sugestis aliĝi al la diskuto. S-ino Trautmann tralegis la liston kaj diris ke ŝi ne jam konas ĉiujn deputitojn, aparte tiujn el Slovakio. Eble ŝi volis atentigi pri tio, ke ŝi ne konas la homojn, kiuj sampartianas (socialista partio) kaj kiuj intencas ĉeesti la diskuton. Post la favora diraĵo, kiun ŝi elbuŝigis, ni povas esperi ke ŝi aliĝos al la grupo, se ŝia parolo pri Esperanto estis sincera kaj se prilingva temo estas sufiĉe kara al ŝi.

Ĉirkaŭ tiu inaŭguro estis organizita tuta semajno de Esperanto, dank' al kiu lokaj amaskomunikiloj sufiĉe kontentige raportis pri la evento kaj Esperanto. Eblas franclingve spekti televidajn elsendaĵojn, legi artikolojn kaj ekscii pli pri esperantisteco en Strasburgo ĉe la retejo de Espéranto-Strasbourg <http://esperantostrasbourg.free.fr/>

Fabien Tschudy

HERZBERG AM HARZ - LA ESPERANTO-URBO

Novaĵoj el Herzberg (<http://www.herzberg.de>)

- en 4 lernejoj 5 grupoj lernas Esperanton,
- lerneja ekspozicio informas pri Amikeco trans limoj per Esperanto
- juna instruisto lernas kun la infanoj por lerni la lingvon kaj spertiĝi pri E-instruado
- ĵus revenis esperantista delegacio el la pola ĝemelurbo Gora, kiela urbestro akceptis la organizontojn de la 2-semajna somerinternacia lernejo SALO-3 (aŭgusto 2008). La ĝemelurba projekto kaj la du sukcesaj antaŭaj Someraj Arbaraj Lernejoj pruvis, ke Esperanto estas rapide lernebla, bone funkcia ponto-lingvo
- inter 6-10 majo ni gastigos esperantistajn gelernantojn el Rybnik, Pollando, kun kiuj ni vizitos la lernejojn kaj kiujn akceptos la urbestro de Herzberg, Gerhard Walter. Ii prezentos sin al loka publiko dum Interkultura Vespere
- ni atendas la akcepton de la ellaborita Comenius-projekto inter Herzberg am Harz (DE), Miskolc (HU) kaj Bar Hill (GB)
- fine de majo venos malgranda delegacio de E-instruistoj el Britio enkadre de la Springboard projekto.



Katalin Kovacs

Katalin Kovacs

AKTUALE AKTUALEGE

Inform-portalo www.aktuale.info eniras en realigan fazon

Aprile aprobis ESF (Esperantic Studies Foundation) la realigon de la projekto „Esperanto aktuale“, kies celo estas krei novan multlingvan inform-portalon, kiu informos pri Esperanto kaj ĝia movado al ĉefe ekstera publiko. Ĝian kreon prizorgos organizo E@I (www.ikso.net), kiu krom aliaj aferoj staras ekz. malantaŭ portalo www.lernu.net aŭ DVD „Esperanto elektronike“.

Pri la projekto ni informis en decembra numero (65), kiam komenciĝis plan-fazo de la projekto. Ekde majo ĉi-jare komenciĝas la realiga fazo de la projekto, kiu devos daŭri ĝis decembro 2008. La realigo konsistas de pluraj laboroj – pretigoj de teknika flanko de la projekto – paĝaro mem, verkado de informaj artikoloj pri Esperanto, komunikado kun E-ĵurnalistoj, ktp.

La projekto estos prezentata ankaŭ dum la ĵurnalista kongreso en Vilnius, samkiel dum UK en Roterdamo aŭ IJK en Szombathely. Realiga Teamo esperas trovi kunlaboremajn informantojn tra tuta Esperantio, por ke la novaĵoj aperontaj estu vere tutmondaj kaj bonkvalitaj.

Por sekvi la evoluon de la projekto kaj ev. helpi ĉe ĝia realigo ni invitas ĉiujn aliĝi al la guglo-listo esperanto-aktuale@googlegroups.com (simple sendu malplenan mesaĝon al menciita adreso kaj revenos al via adreso informo pri tio ke vi fariĝis membro de la grupo).

Peter Baláž

ESPERANTO – TABUA VORTO, POR KIU?

Iu kolego rimarkis, ke Esperanto estas "tabua temo" en Usono. Sed ni ĉiuj scias ke ĉi-situacio estas sama kaj en Eŭropo kaj alikontinente. Multajn simplajn sed tre valorajn ideojn, kiuj povus evoluigi la homaron pli rapide, sen tiom da kostoj kaj perdoj (de mono, tempo kaj energio) la veraj potenculoj de nia planedo ne akceptas. Kial? Pro timo ke ili povus perdi grandajn profitojn? Pro timo ke la homaro suferus ŝokon pro la tro rapida evoluo? Aŭ pro la fakto, ke ili mem ne estas sufiĉe evoluintaj spirite?! Certa estas la situacio, ke ili timas pro Esperanto, same kiel ili timas, ekzemple, akcepti ke la aŭtomobiloj povus funkcii per akvo, ne per benzino... La konkludo: Se ni deziras, ke Esperanto plu evoluu kaj gajnu terenon, ni ne devas atendi ĝis kiam tiuj gravuloj aprobas niajn agojn, ĉar ili tute ne havas tiun intereson.

Pro tio ni devas agi daŭre, sed saĝe, por ke ili ne povu kontraŭstari! Grave estas ke ni ne malkuraĝiĝu, ke ni lernu de niaj eraroj, kaj eĉ el la kritikoj aŭ bonaj konsiloj de la aliaj.

- Ni faru bonajn projektojn kaj prezentu ilin al la oficialaj instancoj, por ke ili subtenu nin finance por realigi projektojn!
- Ni invitu la oficialulojn partopreni niajn kongresojn, por ke ili mem vidu la konkretajn kondiĉojn kaj la veran internacian etoson en kiuj la kongresoj okazas, kaj tiel ili konvinkiĝu pri la utilo kaj pri la granda avantaĝo de komuna lingvo.
- Ni agu en ĉiuj sociaj kampoj, por montri la valoron kaj la utilon de iu Internacia Lingvo!
- Ni uzu pli ofte la amaskomunikilojn por dissendi la informojn pri niaj faroj kaj rezultoj!

Nur per konkretaj faroj, per "konvinkigaj rezultoj" de niaj, ne unuopaj sed multaj kaj bonaj projektoj ni povas instigi tiujn mondgravulojn rekoni kaj helpi nin disvastigi Esperanton kiel internacian komunikilon.

Laŭ mi, la "romantika periodo" de Esperanto pasis. Nun ni devas agi pli saĝe: science, pragmate, serioze. Neniam ni pensu, ke nia laboro restos sen rezulto aŭ ke nia laboro ne havas valoron. Eble ke *la tempo de Esperanto ankoraŭ ne alvenis!* Sed per nia daŭra laboro ni pretigas ĝian vojon... En mia infaneco kaj en mia junaĝo mi revis pri aŭtomobilo, kiu povus flugi kiel aviadilo...Tiam tiu revo estis nur fantaziaĵo.

Sed jen, la jaroj pasis..., antaŭ kelkaj tagoj mi legis, ke tiu speco de aŭtomobilo jam estas inventita de iu studento, kaj dum la sekvaj jaroj ĝi estos realeco! La historio, la vivo de la homaro, same kiel la tekniko kaj la scienco, rapide evoluas, ŝanĝiĝas; ĉiam aperas neatenditaj eventoj aŭ sciencaj malkovroj, kiuj influas nian vivon. *La solvo de komuna lingvo por la homaro tucerte aperos, ĉar tio fariĝas pli kaj pli necesa!* Ni agu esperante je bona estonto, sen atendi tro multajn favorajn decidojn de la nunaj mondpotenculoj; tucerte, ankaŭ tiuj decidoj alvenos iam, sed nur kondiĉe, ke hodiaŭ ni daŭrigu nian laboron...

Memkompreneble, inter la mondaj gravuloj ekzistas kelkaj tre sinceraj kaj deziremaj akcepti la bonajn ideojn, sed multaj aliaj fariĝante potenculoj, altranguloj, ili ne plu volas aŭdi pri "bagatelaĵoj" kiel ekzemple Esperanto. Se temas pri Internacia Lingvo"... "O, Yes. It is, the

English!” Tiuj homoj, tutsimple, ne deziras pensadi. La propraj antaŭjuĝoj sufiĉas al ili... Do ni ne devas atendi eterne iliajn decidojn favorajn al ni. Ni agu daŭre!

Ankaŭ veras, ke la esperantistoj ne devas agi naivece, blinde aŭ fanatike, ĉar tio multe povas malhelpi la strebojn de tiuj, kiuj agas organizite kaj havante precizajn celojn en iliaj laborprojektoj.

Ni imagu, ekzemple, ke la mondaj ŝtatoj akceptus Esperanton kiel Internacian Lingvon... *Ĉu ni estas pretaj solvi tiun grandegan taskon?! Kiom da E-instruistoj ni havas nun?! Kiom da ili pretas por instrui en Afriko, en Hindio aŭ aliloke por esperantigi la teranojn?! Aŭ ĉu ni imagas kiom grandajn ŝanĝojn kreus tia politika decido?... Ne, karaj gesamideanoj, ankoraŭ ni ne estas pretaj...*


La Vojo estas longa! Multaj generacioj de esperantistoj devos konstrui ĝin. Antaŭ ĉio, ni mem devas esti ĝisoste “konvinkitaj” pri la utilo de nia laboro por la estonto de la homaro. Se ni estas pli konsciaj pri tio, kompare kun la supremenciitaj mondgravuloj, ni devas daŭre labori por konstrui La Vojon! Neniam ni ĉesu, neniam ni perdu la esperon! Se hodiaŭ pluvos kaj la ĉielo estas kovrita de nigraj nuboj, morgaŭ brilos la suno kaj ni admiros la bluan ĉielon...

Mihai Trifoi

FILMO PRI ESPERANTO FINPRETIGATA – HELPU PRI SUBTEKSTOJ POR VIA LINGVO!

Montri, ke Esperanto estas viva, uzata kaj tre ŝatata lingvo de multaj homoj – tia estas la celo de nova filmo „**Esperanto estas...**“.

Temas pri 43-minuta informa filmo, kiu prezentas la internacian lingvon Esperanto en moderna kaj vigla maniero. La filmo, dividita je 6 partoj, estas rezulto de 3-jara projekto (2005-2008) kaj kreigis kadre de la organizo E@I – www.ikso.net.



La filmo estos distribuata per DVD-video, kiun ni planas lanĉi dum ĉi-jara UK en Roterdamo (Oficiala premiero de la filmo estos tamen jam dum Ĵurnalista kongreso en Vilnius, sed tiam ankoraŭ sen eblo aĉeti DVDn, kiu estos produktata nur junie). Ni esperas pri antaŭmendoj de Landaj Asocioj, E-klubo kaj unuopuloj – ĉar la filmo ĉefe celas informi neE-an publikon pri la lingvo, ĝi estos ege utila moderna informilo. Unuopaj partoj de la filmo jam spekteblas (en malalta kvalito) ĉe <http://esperantoestas.blogspot.com>.

Kaze ke la filmo ankoraŭ ne estas tradukita al via lingvo, aŭ vi volas helpi pri provlegado de subtekstoj, ev. voĉregistri /dubli/ la filmon, bv. unue legi informojn ĉe:

<http://vikio.ikso.net/Projektoj/ElektronikaEsperantio/Filmo/Eoestas/TradukojVochoj>

Peter Baláž

ZAMENHOF EN LOTERIBILETO



Zamenhof ornamas venontan loteribiletan de la hispana blindulara organizo.

La Organizo de Hispanaj Blinduloj (konata per la siglo ONCE) estas certe unu el la plej sukcesaj en la tuta mondo, pro siaj laboroj en la integriĝo de blinduloj en la socio. Granda parto de la sukceso ŝuldiĝas al ties loterio, tre konata en la tuta lando per la nomo "Cupón". Tiu "kupono", vendata ĉiutage, kaj kun

specialaj premioj en difinitaj tagoj de la semajno, montras foje specialajn bildojn kun diversaj motivoj.

Ni povas jam anonci al vi ke la kupono de la venonta 17-a de majo portos la portreton de D-ro Zamenhof, kun la teksto, "L.L. Zamenhof, creador del esperanto, precursor en la creación de un mundo para todos", kaj apude "2008, Año Internacional de los Idiomas" ("L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pioniro en la kreado de mondo por ĉiuj. 2008, Internacia Jaro de la Lingvoj").

La iniciaton por tiu ĉi demarŝo prenis laborgrupo kiu en la sino de Hispana Esperanto-Federacio organizis diversajn agadojn por la kunmemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008, koincide kun la centjariĝo de UEA, kiujn oni povas legi en <http://www.esperanto.es/proyecto08/>. Grandan meriton oni ŝuldas al la demarŝoj faritaj de nia samideano Pedro Zurita, kiu dum multaj jaroj okupis la postenon de ĝeneralsekretario en la Tutmonda Unuiĝo de Blinduloj.

Por kolektemuloj kaj ĝeneralaj interesitoj ekster Hispanio, Hispana Esperanto-Federacio povas peri la aĉetadon de la bileto. La kosto estos 5 eŭroj por du biletoj, inklude de la sendokostoj. La mendon kaj la detalojn pri la pagoproceduro vi povas ricevi en la adreso admin@esperanto.es. Atentu ke vi povas mendi la biletojn maksimume ĝis unu semajno antaŭ la lotaddato, la 17-a de majo. Kaj ke ni sendos ilin tuj post la lotado: por eviti la katastrofon ke malbonŝance iu el la biletoj estu premiita, kaj ke oni devu redoni ĝin al la Organizo de Hispanaj Blinduloj, oni sendos nur nepremiitajn biletojn.

Estas antaŭvidita gazetarkampanjo en Hispanio por informi al la komunikiloj pri Esperanto kaj la agado ĉirkaŭ la Internacia Jaro de Lingvoj. Ĝi komenciĝos kelkajn tagojn antaŭ la lotado, kaj estos kunordigata de la organizo por blinduloj mem. Ni plu informos pri la sekvoj.

Hispana Esperanto-Federacio

INFORMILO PRI SLOVENA PREZIDADO AL EU APERAS EN ESPERANTO ĈIUMONATE



EEU pretigas Informilon elektronikforme pri prezidado de Slovenio al EU (unua duono de 2008) kaj aperigas ĝin regule ĉiumonate ĉe la paĝoj de EEU. Aperis 4 numeroj ĝis nun. En ĝi aperas oficialaj informoj el la oficiala paĝaro www.eu2008.si laŭ elekto de la redakcio (Zlatko kaj Maja Tišljar) kaj Esperanta Aldono en kiu aperas informoj pri EU kaj lingva politiko kaj rilato al EEU.

La informilo servas por informi esperantistojn sed ankaŭ por esti retradukita al kiel eble plej multaj lingvoj de EU. Dank al sinjoro Leo De Coman kaj lia tradukista reto, oni retradukas la Informilon al la nederlanda kaj al kelkaj aliaj lingvoj (foje ĉeĥa, foje pola...) kaj Maja Tišljar tradukas al la germana. Per tio EEU kontribuas al multlingvisma politiko de EU kaj montras ke ni povas esti tiusence pli efikaj ol ŝtataj instancoj (Oficiala reto de

la slovena prezidado www.eu2008.si aperas nur en la slovena, la angla kaj la franca.) Ni esperas ke la ekzemplon sekvos ankaŭ francaj esperantistoj kaj aperigos similan informilon en la dua duonjaro 2008. Ni invitas ankaŭ interesitajn esperantistojn proponi sin kiel tradukistoj al lingvoj nemenciitaj ĉi tie.

Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2008.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Hispana Esperanto-Federacio, Fabien Tschudy, Katalin Kovacs, Mihai Trifoi, Peter Baláž kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europo.eu